





255615









Dr. ANTONI CZUBRYŃSKI

Esperanta Librotrezoro. № 1.

J. Ŝapiro (Joŝo).

*Babiladoj*

de Bonhumora

Zamenhofano.



Dua eldono.

# VIA DEVO ESTAS

aliĝi al la

**UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO**

12 Boulevard du Théâtre, Genève, Svislando.

## LITERATURA MONDO

**ARTA - ILUSTRITA - INTERNACIA**

Unu numero riĉenhava sv. fk. 0,80 aŭ egalvaloron

**REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO**

**BUDAPEST VI**

**ANDRASSY - UT 81**

## POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto de polaj Esperantistoj

Jarabono 6 sv. frankoj.

Redakcio kaj Administracio:

**Warszawa (Varsovio), Królewska 19**

Polujo.

255.615

17 XI 1936 P.

Dr. ANTONI CZUBRYŃSKI

J. Ŝapiro (Joŝo)

# Babiladoj de bonhumora Zamenhofano

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio

Dua eldono

*Al tre ŝatata fervora  
batalanto por la  
verda afero D<sup>ro</sup> Antoni  
Czubryński  
amike la antona*

1924

Eldonejo J. Ŝapiro, Lipova 33, Białystok, Polujo

25.5.36

*J. Sapiro*

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.



1.255.615

Titolpaĝo kaj ilustraĵoj de G. Hepner †.  
Preaso: „Esperanto Triumfonta“, Horrem b. Köln, Germanujo.

1964D. 327/55



*Al mia  
kara edzino amplene dediĉata.*

*La aŭtoro.*



## Antaŭparolo.

En urbo L... antaŭ kelkaj jaroj fondiĝis Esperanta Societo. Antaŭe ĝi, kiel ofte okazas, multe laboris, poste ĝin „timigis la noktaj fantomoj, batoj de l'sorto kaj mokoĵ de l'homoj“ kaj ĝi, lacigita, ĉesigis entute sian laboron; la sola signo de ĝia ekzistado restis nur la elpendaĵo sur la strata muro. Tiam kelkaj samideanoj, junaj, flamaj organizis novan societeton, kiu prospere disvolvis, malgraŭ la mondeficito, sian agadon je bono de l'homaro.

La prezentataj nun al la legantaro „babiladoj“ montras plejparte bildojn el la vivo de ĉi-tiu societo. La aŭtoro decidis eldoni ĉi-tiujn „babiladojn“, ĉar ili povas havi intereson ne nur por L...aj samideanoj. La atenta leganto trovos ĉi-tie tipojn el sia societo, bone konatajn al li. Jen „grava okazintaĵo“ eble rememorigos, ke li (ho naivulo!) ankaŭ iam ĝojis, kiam liaj samsocietanoj „eldonis“ gazeton kaj ke li pensis, ke ĉi-tiu gazeto alportos gravan utilon al nia tufmonda movado. Eble li ankaŭ revis pri eldono de propra gazeto, se la malnova ne volis presigi lian geniverkon („La Vojo“). Eble li ĉeestis ankaŭ la ĝeneralan kunsidon de ia societo kaj tiam li certe renkontis tiajn bildojn, kiajn priskibas la

„Terura sonĝo“. La juna leganto kaj flama samideano eble sincere kredas, ke ĉiuj Esperantaj societoj okupas sin nur pri Esperanta propagando, — en tia okazo li disreviĝos, traleginte la babiladon „Nia societo“. Povas esti, ke iu glorama (mi volas neniun ofendi, sed pro sincereco oni devas konstati, ke ankaŭ tiajn ni havas) samideano ankaŭ tiel revis, kiel la aŭtoro („Se mi fariĝus idisto“) kaj devis tamen resti Zamenhofano pro iaj misteraj kaŭzoj.

La subskribinto, timante, ke oni nomos lin reformemulo, revoluciulo, malica sespintulo, laŭtvoĉe avertas, ke li ne celis ribeligi la Esperantan popolon, sed li volas nur bonhumore priskribi niajn Esperantujerojn kun, parolante per doktorfiŝera dialekto, iliaj „uloj“ kaj „istoj“, kaj ties „ekoj“, „adoj“, „emoj“ . . .

*Joŝo.*

30. IX. 14.

## Grava okazintaĵo.

Antaŭ kelkaj semajnoj en la Esperanta mondo estis grava kaj eksterordinara okazintaĵo. Kia? Mi vetas, ke vi ne divenos. Vi eble pensas, ke ekz. s-ro Cart fariĝis „progreseculo“, aŭ s-ro Sebert fariĝis kontraŭulo de internacia organizaĵo, aŭ ke s-ro René de Saussure (Antido) ne elpensis novan projekton de Esperanta alfabeto? Ne, ne. Sed kio povis okazi? Eble jam konstruiĝis la Parkurbo, aŭ eble „Pola Esperantisto“ aperis akurate, aŭ „Le Monde Espérantiste“ ne insultis la eminentulojn? Ankaŭ ne.

Kio do povis okazi, vi demandas. Por faciligi al vi la divenon mi diros al vi, ke la okazintaĵo havis lokon en L... kaj koncernas la L... an gesam-idearon.

Ha, vi diros, ni jam scias, kio okazis. Eble oni presigis la verkaĵojn de nia „tradukanta samideano“ s-ro Neskribemski, aŭ eble nia samideano Oratoremulov ne parolis en la societo, aŭ fraŭlino Ridemoviĉ sidis en la societo malgaja? Ne. Do eble nia samideano Reformemski baptiĝis kaj transiris en la eklezion de pastro Schneeberger? Ankaŭ

ne. Eble nia filozofa Parolulov subite mutiĝis? Eble Fervorulov ĉesis venadi societon, aŭ Poeziaĵov skribi amversajojn? Ne.

Mi ne volas vin plu malpacienigi kaj malkaŝos al vi la sekreton: aperis „Vekilo“.\*)

La eldonantoj de „Vekilo“, havinte tro rozajn esperojn, estis certaj, ke tuj post la apero de ĝi niaj estrar- kaj societ-anoj vekiĝos kaj diros: Ni laboru! Sed tiel ne okazis. Ni dormas kaj daŭrigas dormi.

Ni dormas, ni dormas, neniam vekiĝas,

Pri belaj fraŭlinoj songante . . .


Cetere, la „Vekilo“ enhavis nenion vekigan; nur la antaŭparolo kaj versaĵo estis konformaj al ĝia celo. Ni esperu, ke la sekvontaj No. No. estos pli sukcesaj.

Kaj dume ni dormas profunde. L...aj samideanoj bone scias, kiel agrable estas dormi, precipe en la societo; por aliurbaj samideanoj mi klarigos, kial oni venas societon.

Se oni havas tempon kaj ne scias, kion fari, oni foriras en Esperantan societon. Okazas, ke survoje oni renkontas ian samideaninon, ankaŭ rapidantan en la societon, kaj fiam oni iras . . . promeni kun ŝi. En alia okazo oni eniras la societon. En la societo ĉiam estas multaj . . . gazetoj kaj malmultaj homoj. La gazetoj kuŝas sur la tablo, legataj de neniuj esperantistoj; okazas, ke venas neesperantistoj kaj scivole trarigardas ilin, sed de kiam Dio kreis la mondon ne okazis ankoraŭ, ke

---

\*) „Vekilo“ — gazeto de L...a Rondo de Esp-istoj.  
*Rim. de l' aŭtoro.*



### Sinjoro Fervorulov

konstanta dumviva kaj postmorta ano de ĉiujpecaj Esperanto-Societoj; propagandas la verdstelan lingvon en ĉiuj medioj kaj ĉe ĉiuj okazoj.

iu esperantisto tralegis tutan gazeton ĝis fino. Do, veninte en la societon, oni ĉirkaŭrigardas la dormantajn, dormemajn samideanojn kaj vekas ilin per „bonan vesperon!“ (cetere, pli ĝuste estus diri „bonan nokton!“); poste oni iras al ĉiu kaj etendas al li la manon. Kiam ĉi-tiu „manetendado“ estas finita, oni staras unu momenton, pripensante, kaj poste oni iras al la muro kaj legas, ke la regna kuratoro de lernejoj permesis al la societo malfermi kursojn de Esperanto, sed kondiĉe, ke la lernantoj estu ne malpli ol 50-jaraĝaj. Traleginte la permeson oni oscedas kaj diras: „Tamen ion ni faras“ kaj aliras al ĉiuj, etendas la manon kaj diras „bonan nokton!“. Veninte hejmen oni pensas: „Tamen hodiaŭ mi laboris por bono de la homaro! Malmultaj estas tiaj homoj, kiuj kiel mi tiel sindoneme laboras . . .“

Cetere, mi vidas, ke vi tute egale ne kredas al mi, eble pro tio, ke hodiaŭ estas la 1-a de aprilo, kiam ĉiu povas senpage kaj afrankite mensogi. Do, ĉar vi ne kredas al mi, mi ĉesas paroli hodiaŭ kaj babilos alian fojon. Krom tio mi rimarkas, ke vi estas dormemaj; do, karaj, dormu trankvile, vidu belajn sonĝojn . . .


Fulmotondro! Mi skribas por la „Vekilo“ kaj . . . anstataŭ veki mi endormigas miajn legantojn; mi timas, ke la redaktoro lokigos mian manuskripton en la paperkorbon. Do, laŭte mi vokas: samideanoj, vekigu! vekigu! vekigu!



Ni vekas, ni vekas, neniam laciĝas,  
Pri nia la celo pensante,  
Cent homoj vekigōs, nek unu vekigīs,  
Ni vekas, ni dormas konstante.

(„La Vekilo“ No. 2. 1914.)





## Terura songo.

Antaŭ nelonge mi havis teruran songon. Mi songis, ke mi ĉeestas solenan jarkunvenon de ia Esperanto-Societo. Kiamaniere mi venis en la kunvenejon, mi ne povis klarigi al mi, sed en songo ĉio ja estas ebla. Do mi songis, ke mi, neplenaĝulo, nericevinta oficialan inviton, ĉeestis kunsidon de Esperanto-Societo en ia urbo. Kia urbo ĝi estis, mi ne scias, sed verŝajne sufiĉe granda, ĉar ĉeestis tre . . . malmultaj homoj. La prezidanto malfermis la kunsidon per la vortoj: „Gesinjoro! Mi anoncas la kunsido malfermitan.“ Ekaŭdinte tiun strangan idiomon mi ektimis: Eble mi estas en idista kaptilo? Sed mi tuj trankviliĝis, kiam oni klarigis al mi, ke kiel prezidanto de abstinenta societo povas esti drinkulo, same prezidanto de Esperanto-Societo povas ne koni la „nia karan“. Poste estis unuvoĉe (nur unu voĉo estis, tiu de la prezidanto) elektita prezidanto por la kunveno kaj du kunsidantoj. Kiam oni petis la kunsidantojn eksidiĝi ĉe la verda tablo, unu el ili, s-ro Flirtemulov, deklaris en iu stranga nekomprenebla por mi lingvo, ŝajne rusa, ke li ne komprenas, kion oni volas de li. Oni klarigis al li la aferon, kaj feliĉe li konsentis honorigi nin per la



sidado ĉe la verda tablo. Nun s-ro sekretario tralegis diversajn protokolojn, raportojn k. t. p.

Ĉar ciferoj min ne interesas (mi havis en la gimnazio 2 \*) je aritmetiko), mi ĉirkaŭrigardis la gesocietanojn kaj rimarkis kun teruro kaj indigno, ke . . . ili manĝas ĉokoladon. Mi eksciĝis ankoraŭ pli, kiam mi eksciis, ke la ĉokolado ne estas Esperanta, sed ia alia. Mi volis protesti, paroli, sed ekmemoris, ke mi ne havas voĉrajton kaj silentis. Kiam finiĝis la legado de la protokoloj, iu sinjoro petis parolon. Li estis ekscitita, la vizaĝo estis pala, li nerve tremis. Mi jam estis certa, ke li ankaŭ rimarkis, ke oni manĝis ĉokoladon kaj volas paroli pri tio; tial mi jam volis lin aplaŭdi, sed li komencis paroli pri la malagado de la societo dum la pasinta jaro. Kio estis la mal-ago (s-roj drinkemuloj, ne legu mal-ago, sed prefere aliĝu al Tutmonda Esp. Abstinula Ligo. Jarkotizaĵo 50 Sd.) de la societo? En la societo troviĝas nur malmultaj gazetoj, inter kiuj kelkaj estas eldonitaj antaŭ la superakvego. \*)

Kiam mi ekaŭdis ĉi-tiujn vortojn, mi ekĝojis, ĉar mi tute ne sciis, ke antikvaj hebreoj estis niaj samideanoj. Sed mia ĝojo tuj malaperis, kiam s-ro Historiulov klarigis al s-ro Kritikoviĉ, ke la superakvego okazis antaŭ la naskiĝo de Kristo, ke Zamenhof naskiĝis en 1859 post Kristo, Esperanto estis kreita en 1887, unua gazeto Esp. aperis en

---

\*) „2“ malkontentiga noto. *Rim. de aŭtoro.*

\*) Aludo je la kritiko de unu samideano je la jarkunveno de L. . . . a Esp. Societo, dirinta, ke la societa legejo havis nur iajn malnovajn, antaŭdiluviajn gazetojn. *Rim. de laŭtoro.*



1894; do, konkludis li, ni ne povas havi gazetojn Esperantajn, aperintajn antaŭ la superakvego.

Sed s-ro Kritikoviĉ obstine daŭrigis aserti, ke li vidis tiajn gazetojn en la societo, li eĉ bone memoras, ke li legis en la „Revuo“ pri tio, kiel li kreis la mondon, kiel li punis Adamon k. t. p. kaj ĉar la gazetoj ordinare raportas pri la lastaj okazintaĵoj, do estas jam memkompreneble, ke la nomita No. de la „Revuo“ aperis antaŭ la superakvego. S-ro Legistov deklaris, ke la rakonto pri kreo de mondo, pri Adamo k. t. p. efektive estis en „La Revuo“, sed ĝi estis Zamenhofa traduko de la Biblio. Tamen s-ro Kritikoviĉ ne trankviliĝis kaj parolis, parolis, parolis. Dio mia, kiom ĉi-tiu homo parolis! Mi aŭskultis lin atente, ĉar ĉiu vorto elparolita en aŭ pri nia kara lingvo estas jam sukceso de Esperanto, sed fine mi kontraŭ mia volo ne povis plu aŭdi. Stranga afero: ju pli li parolis, des pli ruĝa li fariĝis, des pli palaj fariĝis la estraranoj, des pli dormemaj kaj manĝemaj fariĝis la societanoj. Fine li ĉesis paroli, promesinte post kelkaj minutoj renovigi la paroladon. Poste komencis paroli sinjoro asesoro Flirtemulov. Li (mirinda afero: li esperantistiĝis dum la parolado de s-o Kritikoviĉ, ĉar antaŭe li tute ne sciis, kio estas Esperanto) konstatis ankaŭ, ke la societo faris nenion por Esperanto-afero, ke la gesocietanoj okupis sin nur per amindumo. S-ro Fundamentistov kontraŭdiris, ke ĉio, kio ne estas kontraŭ la Fundamento, povas esti permesata; do ĉar la Fundamento ne malpermesas amindumadon, la societanoj povis kun pura konscienco amindumi. Oni voĉdonis, ĉu estas dezirinda en Esperanto-Societo la amindumado. Neniu estis kontraŭ kaj la deziresprimoj estis ĉiuvoĉe akceptita.

Poste ree sekvis kritikoj kaj paroladoj, respondoj kaj klarigoj, deziresprimoj kaj protestoj, ĉokoladmanĝado kaj amindumado (jam oficiale permesita).

Fine oni elektis novan estraron. S-ro Kritikoviĉ estis elektita kiel estrarano, s-ro Flirtemulov same, s-ro Skandalulov kiel kandidato por estrarano k. t. p.

Kiam oni eksciis la rezulton, komenciĝis disputo, krio, alarmo, bruo. S-ro Skandalulov ofendiĝis, ĉar oni elektis lin nur kiel kandidaton, ne kiel estraron. Li protestis kaj diris, ke li jam konas iom la gramatikon, ekzemple li scias, ke substantivo finiĝas je o, adjektivo je a, verbo en pasinta tempo je u. Do li devas esti plenrajte elektita kiel estrarano.

Sinjoro Flirtemulov protestis, kial li ne estis elektita kiel prezidanto, li ja tute egale venos ne pli ol 2—3 foje dum jaro kaj li povas regule subskribi Esperante sian nomon, ĉar li scias, ke en Esperanto oni skribas „V“, sed ne „W“.

Sinjoro Kritikoviĉ plendis, kial oni lin ne elektis kiel prezidanton: li ja montris al la societo la mankojn de ĝia agado.

Plendis ankoraŭ multaj aliaj, kontenta estis neniu, krom la prezidanto kaj vicprezidanto kaj ankoraŭ kelkaj paroj, ĝoje pepintaj en anguloj. La skandalo fariĝis pli kaj pli laŭta, la nombro de plendantoj, kritikantoj fariĝis pli kaj pli granda, krio kaj bruo netolerebla. La bruo fariĝis bruego, protestoj transformiĝis je insultoj, la insultoj je batoj, la pacaj batalantoj komencis interbati unu la alian, ekaŭdiĝis kriego, iu vokis helpon, subite aŭdiĝis fajfo de policano, la tumulto fariĝis ĉiam pli granda kaj . . . mi vekigis, kovrita per malvarma ŝvito.

La sekvontan tagon mi estis ĉe kuracisto, kiu klarigis al mi, ke mi estas nerve malsana kaj devas akcepti malvarmajn banojn . . .

(„La Vekilo“ No. 3. 1914.)





## Nia societo.

Al la belaj samideaninoj kaj flamaj  
samideanoj el L. E. S. dediĉata.

### Majo.

Bela majo, belega vetero, beletaj fraŭlinoj, bonodoraj floroj, ĝojaj homoj, koketantaj junulinoj. Kiel ĉio estas ĝoja, bela, vivoplena! Ĉio moviĝas, kuras, saltas pro ĝojo, pro la belega majo.

Mi estas malĝoja. Min turmentas doloroj, la koro krevas. Kial, pro kio? Dum majo? Al vi, miaj sinceraj amikoj, mi diros la kaŭzon.

Min malĝojigas ne tio, ke miaj manuskriptoj trovas ĉiaman loĝejon en la paperkorboj de Esperantaj redakcioj, ne tio, ke mi ne estas estrarano de nia societo, ne, min malĝojigas io alia — niaj samideanoj . . . vekigiĝis!

Antaŭe, kiam niaj samideanoj frankvile dormis en la societo, mi per la „Babilado“ vekis ilin por nia sankta labor' Esperanta. Nun majo efikis, la samideanoj vekigiĝis, sed ili tute ĉesis venadi en la socion!

Tio min tre malĝojigis kaj mi decidis fari alvokon al niaj vekigintaj samideanoj, ke ili venadu en la societon.

Samideanoj! Ni nepre devas venadi en la societon. Ju pli da supervestoj kaj ĉapeloj estos en la antaŭĉambro, des pli efika estos la propagando. Nia kortisto sciu, ke ekzistas tamen esperantistoj en L . . . Ne ridu, samideanoj, oni propagandu Esperanton inter kortistoj ankaŭ, ĉar ĝi estos tre grava por nia afero, se nia kortisto, eklerninte Esperanton, fariĝos prezidanto de la T. E. K. A. (ne Tutmonda Esperantista Kuracista, sed Tutmonda Esperantista Kortista Asocio). Krom tio vi venadu, ĉar nia societo donas multajn utilojn al siaj geanoj. La babilejo troviĝas ĉe ni en la antaŭĉambro, estrarejo (demetu ĉapelon, mi parolas pri sanktejo!) en la dua ĉambro, kursoj . . . sur la muro\*), biblioteko — sub la verda drapo de guberniestra tablo\*\*).

La babilejo en nia societo estas la plej necesa ĝia parto; babili oni povas en ĉiuj lingvoj, krom la Esperanta (ĉar mi volis babili Esperante, oni ekzilis min en la „Vekilon“), oni povas babili pri ĉiuj aferoj, pri amaj rendezuoj, amindumado, intrigado, ŝercoj k. t. p., nur ne pri Esperantaj aferoj. Multaj samideanoj tre ŝatas la babilejon kaj eĉ ne eniras la duan ĉambron; ili vizitas por kelkaj minutoj la babilejon

---

\*) Aludata estas la oficiala permeso pri la Esperantaj kursoj, pendinta sur la muro de la S-to, dum la kursoj mem ne estis aranĝitaj.

\*\*) La L . . . a S-to vane klopodis longtempe ĉe la guberniestro pri permeso je malfermo de Esperanta biblioteko. *Rim. de l' aŭtoro.*

kaj foriras kun samideaninoj promeni. La aliaj, pli esperantemaj eniras en la unuan ĉambro.

Super la pordo de la unua ĉambro pendas surskribo „Legejo“, sur la muro „Oni parolas Esperante“. Ambaŭ surskriboj estas malveraj: oni nek legas, nek parolas Esperante, sed prefere dormas. Komprenoble estas esceptoj! Kelkaj niaj samideanoj posedas eĉ oratoran talenton kaj tiuj efektive parolas. Ili parolas flume, entuziasme per la buŝo kaj la manoj, ili pli multe kritikis, ol laŭdas, pli projektas, ol efektivigas, pli promesas, ol faras. Tiaj homoj estas tre utilaj por la societo, ĉar se ili ne ekzistus, estus nenio interesa en la societo, se ili ne ekzistus, la ĝenerala kunveno estus tre enuiga; kontraŭe, kiam ili estas, estas tre gaje kaj ĝoje.

Super la pordo de la dua ĉambro troviĝas surskribo: „Kancelario“, sed vere tie estas estrarejo. Plej bone tion pruvas la fakto, ke tie staras la sonorilo. La estrarejo ĉiam estas malplena, ĉar . . . la estraranoj pro nedependaj de ili kaŭzoj neniam povas veni je estrara kunsido. Kiaj povas esti, vi demandos, la nedependaj de estraranoj kaŭzoj? Mi diros al vi sekrete, sed ne diru al iliaj estraranaj Moŝtoj, ĉar oni eble diros, ke mi estas revoluciisto, intriganto kaj volas mem fariĝi estrarano. Do jen kelkaj kaŭzoj: unu estrarano havas panjon, kiu, komprenoble, malpermesas al li reveni hejmen post la 10<sup>1/2</sup>, kaj ĉar la kunsidoj ne komenciĝas pli frue, ol je la 11-a vespere, li pro nedependaj de li kaŭzoj ne povas ĉeesti la kunsidon. Alia estrarano havas edzinon kaj komprenoble ankaŭ bopatrinon, do ĉu li povas venadi en la societon? Edziĝintaj samideanoj, respondu: Ĉu ne estas pli agrable pace

paroli kun sia bopatrino, ol klarigi al novaj samideanoj la signifon de la vorto: „dormoĉambropord-ŝlosiltruo“? Unu estraranino havas fratinton kaj la fratino havas fianĉon, do ŝi ne povas ankaŭ venadi en la societon. Unu estrarano ne havas fratinton, kiu havas fianĉon, sed li estas enamiĝinta kaj vi jam mem prezentas al vi sekvantajn bildojn: . . . ĉambro . . . muro . . . Zamenhofa portreto . . . tablo . . . papero . . . seĝo . . . estrarano . . . ama letero . . . aŭ alian bildon: strato . . . (aŭ ĝardeno) . . . estrarano . . . ŝi . . . klarigo . . . vangofrapo . . . k. t. p. Do la dua ĉambro estas estrarejo. Sed kie estas la kursoj? Ni ja legis, vi diros, en gazetoj, ke oni permesis malfermi la kursojn kaj nun ni ilin ne vidas. Sed, s-roj, bonvolu nur ekrigardi la muron kaj vi ekvidos niajn kursojn. Jes, ni havas kursojn, sed, bedaŭrinde, ni ne posedas instruistojn kaj lernantojn. Cetere tio estas malgravaĵo: grava estas la fakto, ke ni havas kursojn. Ni havas ankaŭ legejon. Nia legejo estas unikaĵo: en ĝi troviĝas tiaj antikvaĵoj, kiajn eĉ la Esperanta Biblioteko de Davidov ne posedas: ni havas eĉ kelkajn gazetojn, aperintajn antaŭ la superakvego.

Kion la societo havas ankoraŭ?

Du propagandajn foliojn, unu leterkeston, unu ŝrankon, unu verdan stelon kun Zamenhof, du ferajn kaj kelkajn Esperantajn ŝlosilojn, kelkdek stampilojn, kelkajn anonimajn plendleterojn, unu redaktoron, unu delegiton, unu korespondanton, unu tradukanton, unu filozofon, unu oratoron, multajn kritikantojn, unu poeton, unu deklamistinojn kaj unu rublon da malprofito de ĉiu literatura vespero!

Kaj nun, sinjoroj kritikantoj, diru la veron: ĉu vi plendos ankoraŭ, ke nia societo havas nenion, nenion donas al siaj membroj? Ĉu vi diros, ke la estraranoj estas kulpaj pro tio, ke ili ne venas, ĉu vi diros, ke ni ne havas kursojn, babilejon, legejon k. t. p. k. t. p.?

Diru, respondu! Kaj se vi ne estas mensoguloj, se en vi batas honestaj koroj, vi diros, ke la societo havas multon, faras multegon kaj vi tuj ekkuros al la kasisto kaj pagos al li la kotizaĵon por la pasinta jaro, kiun vi forgesis pagi, vi venados en la societon ĝ-foje dum semajno kaj vi vokos ankaŭ aliajn, ke ili venu en la societon:

Ni venu, ni venu, neniam laciĝu  
Kaj pagu la monon kontante,  
Ni ĉiam multiĝu, ni ĉiam pliiĝu,  
Ni venu, ni venu konstante!

29. IV. 1914.



„e  
fa  
in  
vi  
m  
la  
bi  
el  
ek  
uj  
m  
m  
E  
to  
ka  
D  
in  
pr  
kl  
er  
sh

## Se mi fariĝus idisto . . . .

Dediĉata al samideano L. K.

Mi estas homo tre fantaziema: mi tre amas kaj „emas“ fantazii. De infaneco mi kutimis, enlitiĝante, fantazii pri la estonteco, pri gloro, venkoj . . . Mia infana kapo produktis belajn sorĉajn bildojn; mi vidis min en bataloj kun indianoj, sagoj flugas preter mi, sed mi restas senmova kaj miaj pafoj ĉiam trafas la sovaĝulojn . . . Kiam mi fariĝis pli maljuna, la bildoj ŝanĝiĝis. Mi jam revis pri gloro de aviadisto, eltrovinto k.t.p. Kiam mi fariĝis esperantisto, mi ekfantaziis pri tio, kiel mi fariĝos glora en Esperantujo, kiel mi pliriĉigos la Esperantan literaturon per multaj, multegaj, sennombraj tradukoj! Sed baldaŭ mi devis disreviĝi. Miajn tradukojn senditajn en Esperantajn redakciojn mi ricevadis reen; la redaktoroj skribis al mi leterojn, klarigante, ke pro kelkaj kaŭzoj la „ŝafata manuskripto“ ne povas esti presita. Disreviĝinte fariĝi glora esperantisto, mi nun komencis imagi al mi, kio estus, se mi fariĝus idisto. Mi pripensis ĉion bone, ĉion, kion mi farus, kaj konkludis, ke fine mi povas fariĝi glora homo ne nur en Idujo, sed ankaŭ en la tuta mondo kaj esti enskribita en la historion.

Se mi fariĝus idisto, mi unue al neniu dirus pri tio, sed presigus en lokaj ĵurnaloj anoncojn pri tio, ke mi elsendas senpage lernolibrojn de Esperanto. En efektiveco mi sendus al ĉiuj idajn reklamilojn. Ĉi-tion mi povus fari kun pura konscienco, ĉar Ido estas ja Esperanto, sed iom reformita, kaj ĉar ĉi-tiun propagandmanieron jam uzis multaj, eĉ en Rusujo unu moskvano havis librejon „Esperanto“ kaj estis idisto. Poste mi skribus en iu patriota gazeto artikolon, en kiu mi klarigus, ke esperantistoj propagandas ne nur Esperanton, sed ankaŭ Esperantismon, kiu estas tre danĝera kontraŭregna ideo; dum idistoj propagandas nur plibonigitan Esperanton — Idon, sed nenian Idismon. Tial ĉiu vera patrioto devas lerni Idon kaj tiamaniere savi la patrujon. Certe pro tia glorinda ago, kiel savo de l' patrujo, oni donos al mi nomon de unua patrioto kaj . . . laŭ principo de renversebleco de . . . silaboj ankaŭ monon. Tiamaniere mi fariĝos glora ankaŭ en Idujo kaj mi ne dubas, ke oni min faros vicreĝo de ĝi. Sed se tio ne okazos, mi, volante ĝin meriti, komencos bojadi je ĉiuj gloraj esperantistoj. Tiam oni min jam certe nomos vicreĝo kaj tronheredanto de l' Idujo (benata estu ĝia nomo!) kaj oni min elektus en la Idan Akademion. S-ro prezidanto donacus al mi dikan volumon de la „decidoj“ kaj mi enprofundiĝus en ĝi kaj post kelktaga laborado mi prezentus al la Akademio projekton ŝanĝi 7 sufiksojn, akcepti 23 novajn kaj ankaŭ alpreni 700 novajn vortojn. Kiam ĉiuj miaj projektoj estos akceptitaj, mi proponos rekomenci intertraktadon kun la obstinaj fundamentofidelaj malfeliĉuloj. Sed se tiuj lastaj ne volos akcepti nian belan, „harmoniozan“, „logikalan“ lingvon, mi prezentus projekton de duonido-duonesperanto (Esper-



anto + Ido : 2) kaj nomus la novan lingvon „Escosmopolita“. Tiun novan projekton ĉiuj certe akceptus; sed se oni ne akceptus ĝin, mi proponus elekti „delegitaron por alpreno de internacia lingvo por esperantistoj kaj idistoj“. Se la reĝo de Idujo ne povus ĉeesti la kunsidojn de la delegitaro, li sendus min por defendo de Ido. Mi certe fervore defendus ĝin tiamaniere, ke oni decidus ĝin . . . plibonigi laŭ mia projekto „Escosmopolita“. La markizofidelaj idistoj dirus, ke mi estas perfidulo, sed oni ilin ne atentus kaj mi fariĝus glora reĝo de la novfondita „Escosmopolitujo“. Miaj adeptoj konstruas „escosmopolitan ĝardenurbon“ kaj nomus unu straton en ĝi per mia nomo, kaj de l' okcidento ĝis oriento, de sudo ĝis nordo ĉiu ripetus mian nomon . . .

Sed . . . se mi estus idisto, mi ne povus min amuzi pro la bonegaj, facilkompreneblaj anekdotoj en pura Esperanta stilo, kiel ekzemple la jena: „En iu batalo apud Naplo tenis soldato al sia malamiko sub si kaj kun la buŝo ĉe la tero por doni al li ponardfrapojn; la venkito petis al la venkinto lin lasu turniĝi supren kaj tiam ke la malamiko mortigi lin“ . . . \*). Mi ne povus veni en Esperantan societon nur por amindumi belan fraŭlinon, en kiu mi enamiĝis . . . Mi ne povus, veninte al delegito de U. E. A., purigi dum lia momenta foresto la botojn per liaj blankaj kurtenoj . . . Miaj revoj forflugas . . . mi devas forgesi pri gloro, nenio helpas, amo al esperantistino min detenas kaj nur pro ŝi mi restas Zamenhofano. Sed . . . se mi fariĝus idisto . . .

## 2. XII. 1913.

---

\*) „La du steloj“, No. 1—2. 1912.

## „La Vojo“.\*)

La apero de No. 1 de nia „La Vojo“ certe kaŭzos en nia Esperanta mondo grandan impreson. Jam nun, sidante en mia kabineteto, mi prezentas al mi la grandan bruon, tumulton kaj antaŭ miaj okuloj forŝoviĝas, preferiras diversaj bildoj. Jen, en niaj gravaj gazetoj, kiel ekz. „Esperanto“, aperos denove artikoloj „Tro da gazetoj!“ Sinjoroj redaktoroj, redaktistoj, redaktantoj, direktoroj, eldonantoj indignos kaj koleros; „Tro da gazetoj!“ ili furioze krios, ĉiu nova gazeto malutilas al la malnova! Anstataŭ 200 gazetoj kun 8 paĝoj kaj 20 abonantoj ni preferus havi 20 gazetojn kun 80 paĝoj kaj 200 abonantoj! Anstataŭ cent spesmiloj da malprofito ni preferus 200 da profito. For la novajn gazetojn! Ni bojkotu ilin!“

La timemaj esperantistoj, obeemaj al siaj „estroj“ kaj spiritaĵoj gvidantoj, kompreneble sekvas ĉi-tiun konsilon kaj nia „Vojo“ ne povos esti ekspedata en

---

\*) La L... a Esp. S-to decidis eldoni sian propran Esp. gazeton. Ĉi-tiu babilado prezentas kvazaŭ la redakcian programartikolon por ĉi-tiu gazeto. Cetere la gazeto mem pro la eksplodo de la eŭropa milito ne povis aperi. *Rim. de l' aŭtoro.*

la vojon, ĉar ni ne havos monan subtenon. Sed malgraŭ ĉi-tiuj obsinaj baroj ni kuraĝe iras antaŭen :

Kaj nin ne timigas insult' redaktora,  
Nek mondeficito, nek plum' direktora,  
Ĉar bona kaj bela kaj zorge presata  
Ĝi estas — nun „Vojo“ legata.

Sed krom ĉiuj eblaj dornoj en formo de malamikaj artikoloj mi vidas jam la belajn laŭfoliojn kaj leterojn de dankemaj aŭtoroj, poetoj, versistoj, rimantoj, anekdotistoj, problemistoj k. t. p. Kiam aperos la unua sciigo pri la eldono de nova gazeto, tiam malkontentaj estos la redaktoroj kaj kontentaj la estimegataj kaj multŝatataj gesinjoroj „skribistoj“. „La malnovaj gazetoj pro multaj maljustaj kaŭzoj ne volas nin famigi“ — ili diros. „La ambiciaj redaktoroj ne volas, ke la Esperanta mondo eksciu, kiaj ni estas talentuloj. Ili envias al ni, ili timas, ke ni famigos, ke oni presigos niajn portretojn en la „Ondo“, ke nin insultos „Le monde Espérantiste“. Sed la nova gazeto nin certe akceptos kun disetenditaj brakoj. „Egaleco, frateco, libereco“ — jen certe estos la devizo de la nova gazeto. Egaleco — ĉiu presaĵo estos presita per egalaj literoj, niaj nomoj ne estos presitaj per pli malgrandaj literoj, ol tiuj de la eminentuloj. Frateco — oni presigos artikolojn de ĉiuj — de reformemuloj kaj fundamentanoj, de porcentraoficele-anoj kaj kontraŭcentrakuir-ejo-anoj, de Zamenhof-anoj kaj Couturat-anoj. Libereco — oni presigos versaĵojn senrimajn, rakontojn senenhavajn, anekdotojn senspritajn, liberajn vortojn pri liberaj vortoj, liberajn artikolojn pri ĉiuj demandoj religiaj, politikaj, naciaj en speciala „Libera Tribuno“



En la redakcio de „La Vojo“: Oni alportas la manuskriptojn ...

(kiel ekz. en la tre ŝatata „Pola Esperantisto“) k. t. p. Do la nova ĵurnalo montros al ni la vojon por fariĝi famaj. Kiu scias, eble ni ankaŭ fariĝos poste redaktoroj, eble oni nin elektos en la Lingvan Komitaton . . .“ Tiel sendube diros la ŝatindaj samideanoj kaj honorigos nian novan senhelpan gazeton per alsendo de ĉiuspeca materialo. Mi jam fantazias, kiajn grandajn pakaĵojn kun manuskriptoj ni ricevados ĉiutage. Kompreneble ni estos la plej justaj kaj tial neniu manuskripto trovos lokon en la paperkorbo. Ĉiu manuskripto estos zorge trarigardita (escepte: versaĵoj pri amo al kvinpinta stelo, al D-ro Zamenhof, artikoloj pri simbola signifo de Ko-Ko-Ko kaj entute ĉio, kio komenciĝos aŭ finiĝos per vortoj: Vivu Zamenhof, Esperanto, La Vojo estos sen trarigardo presita); post trarigardo la manuskripto estos baldaŭ lokigata en la gazeton, netaŭgaj manuskriptoj estos kolektataj kaj poste vendataj pofunte al komercaĵistoj por ke oni involvu en ili haringojn, bulkojn k. t. p. Tiamaniere neniu manuskripto estos en la paperkorbo kaj anstataŭ malprofito de aĉeto de la paperkorbo ni havos profiton de vendo de la manuskriptoj. Ĉio ĉi-supre dirita rilatas al la manuskriptoj senpagaj. Manuskriptojn pagatajn ni akceptas tre volonte kaj ne hezitante (pardonu s-ro Cart) presigos, se oni donos al nia redaktoro konvenan honorarion.

Kaj nun kelkajn konsilojn pri la eksterajo de la manuskripto. Ĉiu manuskripto estu skribita sur pura, ne makulita per lardo aŭ butero, papero. La papero estu verda, kompreneble (eĉ amaj versaĵoj devas esti skribitaj sur verda papero) kaj havu tre larĝajn margenojn. La enhavon oni skribu nur sur

unu flanko de l'papero, ĉar la duan la redaktoro uzos por siaj privataj aferoj. Koncerne la stilon mi atentigas la verkontojn pri jenaj kelkaj rimarkoj: la vorton Zamenhof, Esperanto, Centra Officejo, La Vojo skribu per pli grandaj literoj; post la frazo „Vivu Zamenhof“ necesas meti kvin!(!!!!) Se vi iun vorton ne povas traduki, senĝene esperantigu ĝin, nome almetu „o“ aŭ „a“, ekzemple „gapo“, „lamento“ k. t. p.

Kaj nun, karaj samideanoj, vi vidas, ke ni estas efektive la plej progresema gazeto, ke ni vere deziras, ke ĉiu esperantisto famiĝu, ke ni ne volas permesi, ke pereu novaj talentoj, estontaj geniuloj — kaj tial, karuloj, subtenu nin ankaŭ, montru vian dankemon kaj sendu po 2 Sm. por jara abonpago en la redakcion de nia „Vojo“. El viaj spesmiloj ni kolektos grandan kapitalon, kiu ebligos al ni pliinteresi la gazeton. Komence ni eldonos ĝin ĉiumonate, poste ĉiudusemajne, poste ĉiusemajne, ĉiutage kaj fine nia „Vojo“ aperos dufoje ĉiutage kun diversaj specialaj aldonoj „Por komercistoj“, „Por ridemuloj“, „Por paperkorbuloj“ k. t. p.

Do, karaj, prenu la plumojn en la manon, monon el la monujo, kuraĝe antaŭen kaj —

Vivu Esperanto kaj „La Vojo“!!!!

24. VII. 1914.



Faint, illegible text at the top of the page, possibly bleed-through from the reverse side.

Second block of faint, illegible text in the middle of the page.

Third block of faint, illegible text near the bottom of the page.

21 JUL 1914



## Enhavo.

Antaŭparolo . . . . .	5
Grava okazintaĵo . . . . .	7
Terura sonĝo . . . . .	13
Nia societo . . . . .	19
Se mi fariĝus idisto . . . . .	25
„La Vojo“ . . . . .	29



---

---

# Verkoj de la sama aŭtoro

## Originalaj:

- La mondmilito kaj Esperanto* (ap. eldono, 1915. Saratova Eld. de Esperanto Biblioteko de G. D.) Ruslingve.
- La „Preĝo al . . . Esperantista Voĉo“.* (Esperantista Voĉo 1919 No. III—IV).
- Pri la „Esperanta Eldona Akcia Societo“.* (Esperantista Voĉo 1920 No. I—III).
- Bialystok, la naskurbo de D-ro Zamenhof.* („The Esperanto Monthly“ 1919 No. 84, „Esperanto Triumfonta“ 1922 No. 115).
- La Vojo . . . ekskursu* („Esperanto Triumfonta“ 1921 No. 16).
- Mortis Vladimir Korolenko* (ET 1922 No. 6).
- Ho, mia plum’!* (ET 1922 No. 73).
- Senitema felietono* („Progreso“ 1922 No. 8) Premiita en la I. Literatura Konkurso de „Progreso“.
- Ovidilo tra Bialystok, la naskurbo de la Majstro.* (ap. eldono 1923, Horrem-Köln. Eld. de „Esperanto Triumfonta“).

## Tradukoj:

- Pensoj de saĝuloj pri fiereco* de L. N. Tolstoj. („Germ. Esp. Gazeto“ 1912 No. 39-40).
- Orienthebreaĵ proverboj* („Germ. Esperantisto“ 1917 No. 3B)
- Informo* de A. Ĉeĥov. (Germ. Esperantisto 1918 No. 5B; „Universala Legolibro“ de W. Fricke, Berlin 1922, „Progreso“ 1922 No. 9).
- Ŝerceto* de A. Ĉeĥov. (ET 1922 No. 89).
- La kvar* de A. Antonov („Revuo“ 1924 No. 4).

## Propagandaj artikoloj nacilingvaj:

- en la gazetoj: „Gazeta Łódźka“ („Łódźpola), „Niedziela Wjestnika Znanja“ (Petrogrado, rusa), „Bialystoker Zeitung“ (Bialystok, germana), „Kownoer Zeitung“ (Kowno, germana), „Neue Lodzer Zeitung“ (Łódź, germana), „Deutsche Lodzer Zeitung“ (Łódź, germana), „Dos naje Lebŋ“ (Bialystok, juda), „Dziennik Białostocki“ (Bialystok, pola).



# Esperanta Librotrezoro

Kolekto da legindaj, zorge elektitaj nur originalaj Esperantaj literaturaĵoj.

Ĝis nun aperis:

**No. 1. J. Šapiro (Joŝo), Babladoj de bonhumora Zamenhofano.** Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. Kun ilustraĵoj. 36 paĝoj kaj kovrilo.

..... „Ĉiu vorto en la libreto estas amuza, la ŝercoj tre spritaj, krom tio ili estas esperantaĵoj ĉiam trafaj, sed neniam ofendaj. Burleskaj bildetoj plialtigas la amuzon: Kun ĉiama rideco oni legos la Babladojn.“

Marie Hankel, raporto de de E. L. A., Nov.-Dec. 1921.

..... „Tre bona kaj klara stilo pligrandigas la guon je la libro“ .....

Esperanto Praktiko No. 5 1925.

**No 2. M. L. Kaplan, Akordoj Esperantaj.** 32 paĝ. kaj kovrilo.

..... „Sentoj noblaj, stilo korekta“ .....

Pola Esperantisto No. 3 1922.

..... „Poemoj, kiuj montras evoluantan talenton“

Literatura Mondo No. 3 1922.

**No. 3. Feliks Hiller, Ho, tiuj fremduloj!** 48 paĝ. kartonita.

..... „Kiam kaj kie gajaj samideanoj solenas grupan festeton ili ludu tiun ĉarman kaj ridigan komedieton“ .....

Esperanto Triumfonta No. 178 1924.

..... „La stilo estas bona. La kantotekstoj estas bone kantebaj ... La melodioj, donitaj en aldono, estas facilaj kaj sufiĉe melodiai“ .....

Literatura Mondo No. 5 1924.

La kolekto estos daŭrigata.

**Eldonejo: J. Šapiro, Lipowa 33, Bialystok**



# **KVAR PUNKTOJ**

instigas nepre aboni al  
**Esperanto Triumfonta.**

Ĝi estas  
**Semajna**  
**Aktuala Ilustrita**  
**Grandformata**

Senpagaj monataj aldonoj:  
„Revuo“ (literatura kaj popolsciencia)  
„Internacia Komerco“.

Senpagajn specimenojn petu de la administracio

**Horrem b. Köln, Germanl.**

0